


*The*  
**NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW**



A Personal Recollection of  
Dr. Zamenhof . . . . . *Wm. Baff*

KRISTNASA RENKONTO  
LULKANTO . . . Lermontov  
Notes on the 1959 Congress

**NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO**

Novembro - Decembro • 1958

*The North American Esperanto Review*  
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,  
U. S. A.

Editor: F. R. Carlson

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders (must be placed in advance) to members of Esperanto League for North America: 10 copies, 50 cents; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 50c per year, 3 for \$1. The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pa. *Treasurer*: Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

*Membership Dues*: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

WE REQUEST YOUR INDULGENCE  
AND HELP

The *Review* is published by amateur volunteer labor. Sometimes we goof!

During recent months, our mailing list got into a truly deplorable state. It has now been corrected and a new addressing system installed. If you know anyone entitled to receive the *Review* who is not getting it, please send name and address.

DID YOU NOTICE OUR  
BACK COVER?

Another new artist, Glenna Cox, draws for the *Review*. Of course, we still have some nifties by Bill Walker to show you.

**The North American Esperanto Review**  
(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)  
Vol. 6, No. 6. Nov.-Dec., 1958

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

*La Revuo ne nur permisas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciaj notoj limiga pri kopio.*

CONTENTS (English)	Page
Esperantists I Have Known	
<i>I. Dr. L. L. Zamenhof</i> . . . . .	3
Local Addresses . . . . .	5
Esperanto in North America . . . . .	10
Officers of ELNA . . . . .	12
Executive Board Decisions . . . . .	13
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto . . . . .	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	Págo
Kozaka Lulkanto — Lermontov . . . . .	2
Trans la Lingvajn Barilojn . . . . .	4
Lokaj Adresoj . . . . .	5
Bonvolu Skribi . . . . .	6
Nia Literaturo . . . . .	7
Kristnaska Renkonto . . . . .	8
Enigmo . . . . .	16

DID YOU READ CORONET?

The November issue contained a very interesting article by Stanley S. Jacobs, "The Tongue That Unites".

THANKS!

*The Tacoma News-Tribune*, November 16, published a full-page article about the *Review* and its editor. The story was written by Dave Richardson.

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 6

Nov.-Dec., 1958

No. 6



## **It's Ninety-nine Years!**

ON THE DATE OF ISSUANCE OF THIS NUMBER OF THE REVIEW, DECEMBER 15, 1958, IT IS 99 YEARS SINCE THE BIRTH OF LUDOVIK ZAMENHOF, FOUNDER OF ESPERANTO. THE NEXT YEAR WILL BE ONE OF GREAT ACTIVITY IN PREPARATION FOR THE CENTENNIAL CELEBRATION OF THIS DATE. THERE WILL BE FESTIVE MEETINGS, PUBLIC PRONOUNCEMENTS, SALUTES TO "DR. ESPERANTO" AROUND THE WORLD. BUT THERE IS JUST ONE WAY, MORE IMPORTANT THAN ALL THE REST, FOR ESPERANTISTS TO CELEBRATE THIS HUNDREDTH YEAR. AT THE OPENING OF THIS 100TH YEAR,

LET EVERY ESPERANTIST ASK HIMSELF:

*"What can I do to make the Centennial Year  
a milestone on the road to the brotherhood of man,  
the understanding among peoples of the world,  
to which our 'Doctor Esperanto' unstintingly devoted  
his great talents?"*



## Kozaka Lulkanto



—M. Lermontov

Dormu, etuleto bela  
mi enlulas vin!  
La kvieta luno hela  
rigardadas vin!  
Mi rakontos fabeletojn  
kaj kantetos mi.  
Dormu, fermu okuletojn;  
mi enlulas vin!  
  
Super ŝtonoj Terek saltas,  
fluas la ondet',  
la ĉeĉen' sur bordon rampas  
kun la ponardet'.  
Via patro estas forta  
kaj mortigos lin.  
Dormu, estu vi kvieta,  
mi enlulas vin!  
  
Venos tempo, vi elkreskos,  
estos batalvir'.  
sur ĉevalo vi ekrajdos  
kun pafilo for.  
Mi borderos la seleton  
per la silko mi.  
Dormu mia infaneto,  
mi enlulas vin!

Vi heroo brava estos  
kaj kozak' – anim'.  
Akompani mi alvenos,  
svingos manon vi.  
Kiom larmoj da amaraj  
veršos la patrin'!  
Dormu, etuleto kara,  
mi enlulas vin!  
  
La doloron akran sentos  
sen konsolo mi.  
Tutan tagon mi preĝados,  
nokte ploros mi.  
Pensos mi, ke vi enuas  
ĉe la fremda lim'.  
Dormu, zorgojn vi ne konas,  
mi enlulas vin!  
  
Donos sur la vian vojon  
sanktan bildon mi.  
Vi, preĝante al la Dio,  
metu antaŭ vi!  
Kiam estos en batalo,  
ekmemoru min!  
Dormu etuleto bela,  
mi enlulas vin!

—el rusa lingvo tradukis A. Holzhaus.



Francis kaj Bonnie Helmuth ĉe la kongreso en San Diego. Ĉu vi volas esti same gaja? Venu al nia kongreso en St. Louis.



### DONATIONS TO THE REVIEW Thanks to

F. J. Dubois	\$5.00
D. D. Bartholomew	\$2.00
for mailing Review abroad.	\$2.00
Glenn Turner	\$8.82

Glenn Turner donates to the Review 25% of receipts of Esperanto League Book Service. The \$8.82 is the Review's share from book purchases by: Bernard Ballard, Vincent Griffeth, Mrs. S. Dunbar Wilson, Howard French, Robert Hitchcock, D. A. Johnsson, Arthur O. Voight, Kenneth M. Hunter, Russell H. Clark.

## ESPERANTISTS I HAVE KNOWN

### ★ Dr. Ludwig L. Zamenhof ★

In 1907 Dr. Zamenhof's inspiring personality was injected into my immediate horizon. My letter to him addressed to Warsaw, Poland, resulted in his reply, exhorting me to stand firm against the onslaughts of the "would-be-reformer", the Idoists. He entered my address with a number in his address book.

In 1910 I met him in person at the Esperantist World Congress in Washington, our nation's capital. We sat together in Lafayette Park, which confronts the White House on one side and on the other the Arlington Hotel where the Congress was in session.

Bialystok, Poland is the common birthplace of Zamenhof and of my father. It seems his father and my granddad moved in the same circles there. The doctor said he was impressed by my advocacy of Esperanto. He recalled receiving a letter from me in which I wanted the Zionists to use Esperanto as a second language. He lauded this idea.

Picture a star-lit, moon-beaming, inviting night enveloping the Potomac River—an excursion boat with Esperantists on board, some dancing on the lower deck; a cluster of chairs upon which are seated, enjoying animated talk in Esperanto, a bevy of Esperantist leaders from abroad.

Dr. Zamenhof is here. I am seated close to him listening, attentively observing. Here is a man of slight build, stately composure, becoming modesty, who in a controlled, assuring vein is telling his impressions about the United States; stating his reactions to innovations in the New World. You see a lit cigarette between his lips, occasional wisps of smoke languorously wafted by timid zephyrs over the ship's railing. The doctor wears a straw

hat, high collar, bow tie. He smiles at random—then complacent traces of heartfelt sensitiveness manifest themselves, and you realize that the talk is captivating.

Dr. Zamenhof suddenly turns about to a spectacle; he is alerted to the focusing of a searchlight across the silvery water's expanse; he perks up in his chair to catch the rays of the searchlight that the vessel's captain has trained upon the now glowing shoreline. He is in a happy, care-free mood. I point out to him that this special focusing of light reveals a hilly eminence on top of which stands the erstwhile home of Washington, Mount Vernon. Zamenhof literally starts up and his eyes wander in profound thought.

I muse: we have here two noble men who startled the world; one attracts gloriously within the reaches of a limited geographical region; the other appeals to us because of the vast sweep in world significance of endowed magnanimity. Dr. Zamenhof—creator of a bloodless revolution in the mutual relations of mankind—the Columbus of global articulation—the Napoleon of already achieved universal intelligence—practical tester of Isaiah's plan of cofraternity—undying diffuser of the sequel to Babel's deterring, vise-like linguistic grip.

—William E. Baff

*The Review is fortunate in having among its contributors one of the first Esperantists in America. Mr. Baff is preparing a series of reminiscences of those early days.*

#### NEW PUBLICITY LEAFLETS

Order from *Esperanto Press*, Oakville, Ont., Canada, the new 2-color, four page leaflet "ESPERANTO, the Solution to the Language Problem". Based on the ELNA leaflet "The World Is Getting Smaller", but reduced for sending with an ordinary letter, it sells (postpaid) for: 50 copies, 40¢; 250 for \$1.75; 1000 for \$5.00.

# Trans la Lingvajn Barilojn

*Aventuroj de novbakitaj geesperantistoj. Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, post jaro kaj duono de lernado, entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj sendis serion de raportoj al la Revuo.*

MADRIDO, Hispanio, la 20an de Februaro, 1957 — La granda ĉefurbo de Hispanio bonvenigis nin per la Esperantistaro kiu gastigis nin dum kvintaga restado. Tuj post nia alveno ĝi la Hotel Norte mi telefonis S-ron Florencio Enfedaque, la UEA delegito, kiu venis ĝi ni, kaj ni interparolis dum du horoj en la ripozejo de la hotelo. Ĉar li devis reiri al sia oficejo por labori, ni adiaŭis ĝis la sekvonta tago.

Sabaton S-ano Enfedaque kondukis nin al la hejmo de la prezidanto de la Esperanto-klubo en Madrid, S-ro Angel Figuerola. Li estas blindulo, sed li vivas tute normalon vivon, kun sia familio, kiu konsistas el ses infanoj kaj ĉarma edzino. Li ankaŭ estas profesoro de klaso en la blindlernejo, proksime de lia hejmo. Ni iris kune tien, al granda moderna konstruaĵo kie kvincent blindaj gejunuloj loĝas kaj studas. Por la unua fojo en mia vivo mi vidis la internon de blinda lernejo, la metodojn de instruado kaj vivo de la blindaj studentoj, kaj dum la vizito ni renkontis la lernejestrin, ankaŭ blindulo, kaj kelkajn instruistojn. Ĉe la lernejo ankaŭ S-ano Figuerola gvidas Esperanto-kurson, kaj ni renkontis ok komencantojn kiuj aŭskultis malrapidan paroladeton de mi.

Post la vizito al la blindlernejo, je la naŭa vespere, ni iris, subterfervoje, al la klubejo de la Madrida grupo. Tie ĉeestis ĉirkaŭ dudek kvin geesperantistoj kaj dum la tuta kunveno ili faris demandojn al mi kaj Bonnie, pri San Diego kaj nia vivo en Usono. Ankaŭ, la delegito, S-ro Enfedaque, aranĝis ke mi faru prelegon sekvantan mardon.


Krom kunvenoj trifoje ĉiusemajne, la Madrida klubo ankaŭ kutime kunvenas ĝi

kafejo en la urbo ĉiudimanĉe, posttagmeze. Tie ni kaj la madridaj geesperantistoj interbabilidis dum multaj longaj horoj, trinkante tasojn da kafo kaj teo, en tre agrabla atmosfero, laŭ la nacia kutimo.

Car la Madrida klubo kunvenas trifoje ĉiusemajne, ni denove, lunden vespere, povis ĉeesti la kunvenon kaj esti inter niaj samlingvanoj. Post la kunveno ni kune kun S-ro Enfedaque, iris al kafejo kie ni manĝetis, trinkis kafon kaj ĝuis bonan interparolon ĝis la malfruaj horoj.

Oni aranĝis specialan kunvenon marde, por ke mi povu fari paroladon al la gesamideanoj en Madrido. Ĉeestis la kunvenon proksimume kvindek personoj, inter ili la estro de la oficiala turistoficejo en Madrido. Li ne estas Esperantisto sed li diris ke li venis por aŭdi eksterlandanon paroli Esperante.

Post la prelego la adiaŭado komenciĝis denove, al multaj Esperantaj geamikoj kiujn ni eble neniam revidos. Feliĉe, neniu scias pri la estonteco kaj ĝiaj okazaĵoj. Eble ĝi kunportos por ni la eblecon de vojaĝo por ĝui kaj tiamaniere niaj multaj amikoj povos viziti nin en San Diego.



Esperanto helpas al la interkomprenejo

## **Local Addresses**

The Review lists, without charge, addresses of local Esperanto groups or of Esperantists who want local contacts to form new local groups. It is not necessary that the members of such groups be members of the League. ELNA exists for the purpose of helping all who want to promote Esperanto. If you want advice on forming a local club or study group, write to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa.

In case of a group representing some religious, political or other special interest, please state affiliation or special interest. We make no judgment, and accept no responsibility, concerning Esperantist special interest groups, but will list addresses (if in North America) so that persons of similar interests may find congenial groups.

Kanada Esperanto-Asocio: Box 52, Terminal A, Toronto, Canada.

ELNA Youth Section: Charles Powell, Route 1, Box 41-A, Wimauma, Florida.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 50 Overlook Terrace, New York 33, N. Y.

Sacramento Esperanto Club, 5631 Balboa Circle, Sacramento, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave.,  
Lakewood, Cal.

Skolta Esperantista Ligo, Massachusetts-Grupo, Thomas Duncan, Grupestro,  
73 Winchester St., Brookline 46, Mass.

Kontraŭbabela Ligo de Tampa, 403 East North St., Tampa 4, Florida.

Napa Esperanto Club: c/o Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, Cal.

Esperanto Society of Chicago: c/o H. Tobusch, 55 E. Washington, Chicago, Ill.

Esperanto-Rondo de Philadelphia: c/o Ukrainian Savings and Loan Association,  
847 N. Franklin St., Philadelphia 23, Pennsylvania.

Lucy Pier, 807 Bon Air Road, Lansing 17, Mich.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Canada.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.

Tom Haxby, P. O. Box 274, Marshall, Arkansas.

Mrs. Starling Przybilla, P. O. Box 685, Whitehall, Wisconsin.

Frans Jahger, 2734 Locust Drive, Bridgeville, Pa.

ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE, Middleton, Wisconsin.

---

## **ELNA membership & organization committee**

c/o Wm. R. Harmon, 4725 Briercrest, Lakewood, California

## Bonvolu Skribi

La *Reuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (gis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado en *Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 gis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poštarto; bk., bildkarto; pm., poštmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interš., interšanĝi; p. ē. t., pri ĉiuj temoj.

Ernest Black, 440 East 79th St., New York 21, N. Y. Usono. Komencanto. Dez. kor. kun komencantoj en ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Geraldo Saares de Oliveira, Cubatao, E. F. S. J. (Est. S. P.), Brazilio. Dez. kor. kun usonaj samideanoj per letero kaj pk.

Karel Rybka, Leninova 34, Svitavy, Ĉehoslovakio. Dez. kor. kun usonanoj.

Laczko Karoly, Budapest IX, Gonczi Pal u 2. Hungarujo. Alumetetiketojn, pecon por peco aŭ kvante.

Vadas Mihaly, Sarkad, Kiss u 3, Hungarujo. 30-jara librotenisto. Glumarkojn, E-poštmarkojn, pk.

Panstwowe Liceum Muzyczne, Esperanto-Grupo, str. Lowiecka 13/17, Wroclaw, Pollando. LETERVESPERO kun Esp.-eksposicio (1 Marto, 1959) ĉe Ŝtata Muzika Liceo. 40 gelernantoj 15–20-jaraj, estontaj geartistoj, dez. kor. Amase sendu leterojn, salutkartojn, ĉiajn esperantaĵojn por propagandi en lernejaj rondoj.

Ant. Uhl, Wien XIII, Speisingerstrasse 84/XI/7, Aŭstrio. Dez. interš. pm., pokvante, 100 por 100.

Nguyen Minh Thanh, B. P. 482, Phnompenh, Kambodio. 20-jara fraŭlino dez. kor. kun fraŭlinoj, interš. pk. kaj modgazetojn.

S-ino V. Grdanovich, 10, Richmond Terrace, Shelton S. O. T. Staffs., Anglujo. Dez. kor. kun usona bibliotekistino (precipe "reference library") pri fakaj problemoj.

S-ro Zdzislaw Rabecki, ul. 1 Majo 73/7, Lodz, Pollando. Juna mekanika inĝeniero, dez. kor. kun usonanoj.

Mihai Stefan, Str. Dorobanti 356, Braila, Rumanio. 23-jara inĝeniero en fervoja telekomunikado, dez. interš. revuojn de scienco kaj filmo, danemuzikajn partiturojn ktp., kor. kun usonanoj.


Antonio Martin, C U Lope de Vega No. 37b, Puebla Nueva, Barcelona, Hispanio. Dez. interš. pm. grandkvante (katalogo Ivert).

Czeslaw Szatkowski, Gdynia 1, Migaly 43/17, Pollando. Por si kaj por klubanoj, dez. kor. pri televizio, numismatiko, folkloro, ktp., interš. bk., pm., bildojn, gazetojn, gramofondiskojn, flagetojn, ceramikajojn kaj aliajn malgrandaĵojn de popola karaktero.

El Rousse, Bulgarujo, venis korespondeto kun nelegebla nomo kaj adreso.  
SKRIBU KLARE!

---

NORDAMERIKANOJ, ATENTU ! La *senpaga* anoncado en la *Reuo* estas nur por alilandanoj kiuj volas korespondi kun nordamerikanoj. Ni tiel celas provizi al nordamerikaj legantoj taŭgan aron de korespondantoj, por stimuli korespondemon en nia lando. *Nordamerikanoj pagu minimume \$1 por anonci sin.*



## Nia Literaturo

Literatura Redaktoro: D. B. Richardson,  
3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington  
(La libroj recenzitaj en ĉi tiu rubriko estas  
mendeblaj ĝe: Esperanto League Book  
Service, Middleton, Wis.)

Kia devus esti la rolo de recenzanto de  
Esperanta literaturo?

Tio estas demando kiu multe okupis  
min. Ŝajne, oni povas alproksimiĝi al ĝi  
laŭ du tre apartaj vidpunktoj.

La unua estas la vidpunkto de la aŭ-  
toro mem, aŭ de aliaj verkistoj de Espe-  
ranta beletro. Ĝi koncernas sin laŭ klasikaj  
terminoj kun la artisma valoro de la verko  
recenzata. Kaj tion farante, la recenzo  
mem ofte estigas speco de beletristiko.

La alia vidpunkto estas tiu de la le-  
ganto, de la eventualaj aĉetantoj de libroj.  
Ĝi estas multe pli populara vidpunkto,  
kiu koncernigas kun la legebleco kaj — pli  
grave — la legindeco de la verko. Tia re-  
cenzo respondas al la demandoj de la ha-  
zarda, eble ne beletre inklina Esperant-  
isto: *Kia estas ĉi tiu libro? Ĉu ĝi interesas  
mi? Ĉu ĝi valoras, ke mi elspezu mian  
monon por ĝin aĉeti?*

Recensojn laŭ la klasika maniero oni  
povas legi en *Esperanto* kaj *Heroldo*, an-  
kaŭ en multaj aliaj Esperantaj gazetoj.

Sed mi ĝenerale prezentas la recensojn  
en ĉi tiu rubriko laŭ la dua vidpunkto, tiu  
de la leganto. Se mi sentas ion speciale

forte pri la beletra aspekto de literatura  
verko, eble tiam mi komentas mallonge  
pri tio.

La kontrasto inter la du vidpunktoj es-  
tas eksterordinare evidenta en la kazo de  
du novaj eldonoj. La unua, *Sonje sub  
Pomarbo*, de nia literatura giganto, Julio  
Baghy, prezentas literaturan kreaĵon de  
la plej alta nivelo; la libro, la plej nova  
produkto de la Stafeto-serio de Juan Ré-  
gulo Pérez, estas verko kiu ravas la aman-  
tojn de Esperanta beletro de Edinburgh  
ĝis Wellington. Sed ĝi la hazarda Espe-  
rantisto ĝuas ĝin? Ĉu li ne trovos la klasikajn  
aleksandrajn versformojn pezaj —  
eĉ eble tedaj? Ĉu li ne opinias, ke la  
dramo iras tro malrapide (pardonu min:  
tro lante)?

Kaj tamen Baghy verkis percepse, trafe,  
instrue pri la vivo.

Alia nova eldono estas *Esperanto tra la  
Mondo*, de Consuelo de Sanchez-Latour.  
La libro konsistas el artikoloj pri Espe-  
ranto-movado, pri Gyatemala (patrujo de  
la aŭtorino-kompilintino) kaj pri la ĉefaj  
mondpartoj. La artikoloj estis ĉiuj ver-  
kitaj, je la peto de S-ino Sanchez-Latour,  
de ŝiaj Esperantistaj gekorespondantoj tra  
la mondo. La verkintoj estis ĉiuj kapablaj,  
sed ne necese la plej elstaraj Esperant-  
istoj; la leteroj ne estis korektitaj en la  
redaktado, do ili ankoraŭ staras kun la  
originalaj eraretoj kaj naciismoj, kiuj ne-  
niel ĝenas la leganton, sed nur aldonas  
guston kaj intimecon al tre interesa libro.

Ĉiuj artikoloj estas ripetitaj en hispana  
lingvo.

Do al ĉiuj seriozaj literatur-amantoj mi  
rekomendas tre forte la unuan verkon de  
Baghy; sed al tiuj, kiuj ŝatas malpli pezan  
legadon — kiuj opinias, ke "beletristiko  
estas por ovkapoj" — mi rekommendas la  
duan verkon. Mi estas certa, ke ĉiu Espe-  
rantisto en Norda Ameriko trovos ple-  
zuron, legante *unu* el la du libroj.

# KRISTNASKA RENKONTO

*de DAVID RICHARDSON*

**N** LA JARO 1944 la mondo estis multaj mondoj. En meza Eŭropo flagradis ĉionkonsuma milito, kies viktimoj estis domoj kaj urboj kaj la vivoj kaj spiritoj de homoj. Trans la globo furiozis alispeca milito, kies scenejo estis la salakvegoj de la "Pacifika" Oceano, kaj kelkaj izolaj senutilaj insulaĉoj.

De Alasko ĝis la norda poluso la mondo konsistis el malvarmo, glacio, koto, soleco, tediĝo, kelkfoje morto. De Ĉinujo al Hindujo ĝi konsistis el varmego, malsanoj, atendoj, sapiroj, ofte foje morto.

Dume en aliaj mondoj la milita tušo estis ankoraŭ alia. En Moskvo kaj Parizo kaj Tobruk regis kvieta ĝojo pri rehavata libereco. En Londono kaj dekoj de aliaj urboj grandaj kaj malgrandaj la popoloj estis nur dankemaj, ke en la noktaj ĝieloj la morto flugis pli kaj pli malofte.

Pli subtila estis la milita tušo en foraj terpartoj: en Caracas, kaj Toronto, kaj Timbuktu. Ankaŭ en San Francisco, kaj Seattle, kaj Nov-Jorko.

Nov-Jorko. Estis 24a de decembro. Juno viro, soldate vestita, marŝis laŭ homplenaj stratoj. Antice al la Kristnaska morgaño, multaj el la stratirantoj portis pakaĵojn, ofte brilkolore binditajn, ofte en tia amaso, ke malfacilis vidi la vojon antaŭe. Ne necesus aŭguristo por diveni, ke ĝi tiuj ruĝvangaj, larĝgridetaj geviroj rapidas al siaj varmaj hejmoj, al atendantaj geamatoj.

La junu soldato ne portis pakaĵojn, nek rapidis al sia hejmo aŭ gekaruloj, ĝiar ĝi tiuj troviĝis je distanco de kelkaj miloj da mejloj. Tial li iris iom malpli urĝe, iom pli sencese ol la aliaj trotuaranoj. Kontraŭ la malvarmeco de la posttagmezo — jam faleatis unuaj kelkaj neĝfloketoj — li tenis la manojn en la pošoj, spite la nesoldatecon de tia teniĝo.

Unu horon pli frue la soldato vizitis

telefonoficejon. Li demandis pri alvoko al la hejmurbo, San Francisco, sed mezaĝa virino malantaŭ la servtabulo nur skuis la kapon senhelpe, klarigante pri "okupataj trunkoj" kaj "dekhora malfruo." La oficistino rigardis al li kompate, sed ŝi ne povis helpi.

Nun la soldato paŭzis antaŭ granda konstruaĵo, ĝi kiu li legis konatan nomon de radiobrodkasta kompanio. Malantaŭ vitrino vidiĝis bildoj de kelkaj famaj geartistoj, kiuj brodkastos tiun vesperon. Sube estis ŝildo kun avizo: "Vizitantoj Bonvenaj. Trakonduko Ĉiun Horon."

Li eniris kaj alpaŝis servotabulon. Malantaŭ ĝi sidis beleta junulino kun longaj brunaj haroj. La soldato alparolis ŝin.

"Mi scivolas — ĉu mi povas kuniri kun la sekvanta grupo de vizitantoj?"

La knabino ridetis afable. "Mi bedaŭras. La gvidistoj ĉiuj iris hejmen. Ni ne atendis vizitantojn je antaŭchristnaska vespero."

Ĉagreno montriĝis sur la vizaĝo de la soldato. La junulino vidis tion, kaj diris, "Sed mi mem estos libera post nur du-tri minutoj. Se vi deziras, mi kondukos vin."

La vizaĝo de la soldato ekbrilis denove. Tiam ĝi ree ombrigis. "Ĉu vi estos fininta por la tago? Ĉu vi ne volos iri rekte hejmen al la familio?"

"Ho, ne. Mia familio ne troviĝas en Nov-Jorko. Ili estas ĉiuj en Davenport, Iowa. Mi verŝajne pasigos kvietan ves-

peron kun apartementa junulino. Dek minutoj ne domaĝos."

Pasis kelkaj minutoj kaj venis nova knabino por anstataŭi. La junulino elvenis de antaŭ la servtabulo, kaj kun rideto al la soldato kapsignis lin sekvi. Ili kune inspektis du grandajn brodkastajn studiojn, kiuj estis ambaŭ tute senhomaj, politaj nur per kelkaj solecaj mikrofonoj kaj tri-kvar groteskaj rangoj da muzikteniloj. Post la vizito al la laboratorio de sonefektoj kaj al la centra kontrolĉambro, ili refoje eniris la antaŭvestiblon.

La soldato komencis danki al la junulino, sed subite li interrompis sin por eljeti, "Ĉu vi ne permesos al mi konduki vin al kafejo? Estas ja malvarme, kaj vi mem diris ke vi ne havas planojn."

Ŝi estis surprizita, iom embarasita, kaj reflekse komencis respondi nee. Sed ŝi rigardis en la vizaĝon de la soldato, vidis ĝin malferma kaj tute sen artifiko; tiam ŝi ekridetis, kaj jesis.

Ekstere estis rapide vesperiĝante. La neĝo falis ankoraŭ nur sporade, kaj paperdika tavoleto neĝa kuſis sur la stratoj. Stratlampoj brilis blue. La hejmenirantoj iris iom pli urĝe ol antaŭe.

En la eta kafejo paggramofono ludis Kristnaskajn kantojn. La soldato kaj la knabino eksidis. Kiam la posedanto alvenis kun du vaporantaj tasoj da kafo, ili tuj levis ilin kun frostotremantaj manoj al siaj lipoj.

"Ĉu vi scias, ke vi eĉ ne diris al mi vian nomon?" fine komentis la soldato.

"Ne vere gravas, ĉu? Post dek minutoj ni disiros, kaj vi neniam vidos min denove."

La junulo iom ruĝiĝis, kaj turnis sin silente al la kafotaso.

"Tio ne estis riproĉo," klarigis la knabino, sed ŝiaj vortoj sonis iom lame. "Nu, ne por vi, almenaŭ."

Ŝi surtabligis sian tason kaj prenis ion el mansaketo. "Rigardu," ŝi diris, etendante la objekton al la junulo. Ĝi estis foto, kiu prezentis belan, junan viron vestitan en soldata uniformo. "Tiu estas mia fiancéo. John Simpson. Li estas kaporalo, ie en Francujo. Alsace-Lorraine, mi pensas."

La soldato rigardis ŝin. "Mi vidas, ke vi amas lin tre multe."

"Jes," ŝi respondis simple. "Tre multe."

"Ankaŭ mi portas foton," diris la junulo, tirante monujon el sia pošo. Li elprenis la iom ĉifitan bildon kaj tenis ĝin por la rigardo de la knabino.

"Kiel bela ŝi estas," diris la junulino, kaj ŝia admirado estis reala. La knabino sur la bildo havis delikatajn trajtojn kaj escepte dolēan rideton. La foto estis subskribita: "Kun amo. Mary Kelly."

"Ni volis geedziĝi," diris la soldato. "Sed pro la milito—. Nu, mi estas fusilisto. Infanterio. Vi scias kion tio signifas. Post kelkaj tagoj—morgaŭ, eble—mi iros transmaren. Kiu scias kiam mi revenos? Aŭ ĉu?"

La knabino tuſis lian manon. "Vi revenos. Mi estas tiel certa."

Sekvis momenta embaraso, kiun ili finis malplenigante la tasojn. La soldato metis moneron sur la tablon, kaj ili ekstaris, eliris denove en la eksteran duonlumon.

Ili staris sur stratangulo dum momento, rigardante unu la alian. Apude troviĝis enirejo al subtera fervojo. La strato estis fariĝanta preskaŭ senhoma. Ili etendis siajn manojn por adiaŭa manpremo, kiam la junulino proksimiĝis al la soldato, levis siajn lipojn kaj kisis lian vangon, dolē, senteme. Tiam ŝi flustris, tute mallaŭte, "Gojan Kristnaskon, John Simpson."

Kaj li respondis flustre, honeste, "Gojan Kristnaskon, Mary Kelly," kaj ŝi turnis sin rapide kaj malaperis en la subterejon.

# Esperanto in North America

UNITED NATIONS, N. Y.—The UN Esperanto Club has been formed as a result of the Esperanto classes among UN personnel previously reported in the *Review*.

Eskil Svane, one of the original organizers and teachers of these classes, has returned to his native Denmark after a two-year stay in the U.S.

Mr. Svane, besides working and studying in the field of comparative and international law, found time to travel through much of the U.S., Canada and the formerly Danish islands of St. Thomas, St. John and St. Croix, and taught Esperanto classes in Wilmington and Detroit, as well as at the UN.



NEW YORK, N. Y.—The New York society has a new meeting place, the Baha'i Center at the Hotel Hargrave, 112 No. 72nd St. Meetings will be held here on the second Friday of each month (except for the special Zamenhof festival in December); also classes at the same location every Tuesday for beginners and for advanced study.

Esperanto grammars and dictionaries are now being sold at the World Affairs Center bookstore (across the street from the UN). A permanent display on the UEA's consultative relation with UNESCO will soon be established.



ST. LOUIS, Mo.—George Falgier is now teaching Esperanto classes at the Humanist Center and at the Central Public Library. Over 50 students are now enrolled in the two classes. The youngest student is 8 years old.

On the fourth of October, Mr. Falgier spoke on Esperanto at a meeting of The

Modern Language Club. Most of the 40 persons in the audience were language teachers. Dr. Englander recited Esperanto poetry, which aroused much favorable interest.



UNIVERSITY CITY, Mo.—An Esperanto club has been organized at University City Senior High School, sponsored by Mrs. Marguerite Slack. It has 35 members, including three teachers.



SEATTLE, Wash.—Members of the Henry Library class attended the November club meeting, tape-recorded and listened to their own readings of Esperanto material and sang Esperanto songs for the recorder.

Manuel Arias Luna, touring the U.S. with the Mexican State Symphony Orchestra, is visiting local Esperantists as he travels. He introduced your editor to several orchestra members who are learning the international language, and to Hanêjo Esperantisto (Johnny Esperantist) who is probably the only ventriloquist's dummy in the world who speaks only Esperanto.



LOS ANGELES, Calif.—Mr. Scherer, "Scout Leader of the Week" spoke on Esperanto in the scouts' weekly radio program, where he was being honored for his 15 years of service.

An Esperanto display will open soon at the Los Angeles Central Library.

The publishers of *Coronet* arranged a TV interview with Mr. Parrish in connection with the excellent article, "The Tongue That Unites," in the November *Coronet*.

(Continued on page 11)

4209 S.

## Esperanto in North America

(Continued from page 10)

SANTA MONICA, Cal.—Besides an evening class at the YWCA, there is a lunch-hour class for scientists at the Rand Corporation, another at Ramo-Wooldridge and a conversation group at the YMCA.

Electronic Brain knows 2000 words! Mr. Nelson Lucas of the world famous Rand Corporation in Santa Monica is experimenting with one of the electronic translating machines and reports that "it" is handling Esperanto very well. Esperantists are invited to visit Mr. Lucas at the Rand Corporation, 1700 Main St. Ex 3-0411, ext. 615; or Texas 0-3351, ext. 615.



SAN DIEGO, Cal.—Francis Helmuth, who attended a course for Cseh-method instructors at the 1958 Universal Congress of Esperanto, is now using the Cseh method in teaching a class at San Diego Evening School.



SACRAMENTO, Cal.—Ida Belle Craig teaches an evening school class of 30 students. Six others are participating in the class by home study.



The Esperanto Club of Sacramento has become a member of the United Nations Committee for Sacramento and participates in the public affairs of the Committee, such as the UN booth at the State Fair and the UN International Festival.

The name "Esperanto Delegito" will appear in the next issue of the Sacramento telephone book.



Prof. Enrique Balech, now in California, former president of the Liga Argentina de Esperanto, has been elected a Life Member of LAE.

## MEET ME IN ST. LOUIS, LOUIS



Melbourne Hotel

Let's get together at the Congress at the Hotel Melbourne. They have set aside a block of about 50 rooms for our crowd, and there will be more available if needed.

They have also provided suitable halls in the hotel itself for all our meetings; the Terrace Room for our business meetings, the Colonial Room for our banquet and public meeting.

There'll be a banner outside the hotel to let the world know the Esperantists are meeting there. And we'll have space for exhibits in the West Lobby, where our registration crew will be busy.

At the Melbourne there is no discrimination as to race, color or creed. Rooms cost: Single, \$6.25 to \$9.25; double, \$8.75 to \$11.25; twin, \$11.25 to \$13.75.

At no extra cost, cribs or roll-away beds will be set up for youngsters up to 14 years old, who occupy a room with an adult. Strollers and high chairs are available when needed.

For more information on the Congress write to: Esperanto Congress Committee, c/o George Falgier, 3622 North Market St., St. Louis 13, Mo.

## OFFICERS of ELNA

President: Armin F. Doneis, Sr.  
Box 105, Pharr, Texas.  
Vice-President: Dirk Brink,  
Box 5953, Metro Sta., Los Angeles 55, Cal.  
Secretary: Conrad Fisher,  
808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.  
Treasurer: Adrian Hughes,  
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

## EXECUTIVE BOARD

Thomas A. Goldman, Chairman,  
2511 P St., N. W., Washington 7, D. C.  
Forrest J. Ackerman, 915 S. Sherbourne  
Drive, Los Angeles 35, Calif.  
Howard G. Borden,  
1072 Stuyvesant Ave., Trenton 8, N. J.  
Francis E. Helmuth,  
P. O. Box 6215, San Diego 6, Calif.  
John L. Lewine,  
50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.  
Wm. Harmon,  
4725 Briercrest, Lakewood 11, California.

David B. Richardson,  
3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.  
Miss Roan U. Orloff,  
31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.  
Elwyn C. Pollock,  
2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.

## ELNA'S COMMITTEE CHAIRMEN

Executive: Thos. A. Goldman, 2511 P St.,  
N. W., Washington 7, D. C.  
Membership and Organization: Wm. R.  
Harmon, 4725 Briercrest, Lakewood, Cal.  
Publicity: Dirk Brink, Box 5933, Metro  
Station, Los Angeles 55, Cal.  
Finance: Thos. A. Goldman, 2511 P St.,  
N. W., Washington 7, D. C.  
U. N. and non-Esperantist Congresses:  
John Lewine, 50 Overlook Terrace, New  
York 33, N. Y.  
Nominations: Elwyn Reed, 11420 Biona  
Drive, Mar Vista 66, Cal.  
Migrating Exhibit: George Falgier, 3622  
N. Market St., St. Louis 13, Mo.  
Youth: Charles Powell, Route 1, Box 41-A,  
Wimauma, Florida  
Education: John Lewine, 50 Overlook  
Terrace, New York 33, N. Y.

If you have information or help to offer,  
these committee chairmen will be delighted  
to accept it.

\*\*\*\*\*

  
**Deak & Co., Inc.**  
Foreign Exchange  
International Travel  
550 South Hill Street  
Los Angeles 13, California

Dirk Brink, Branch Manager  
Ĉiujn viajn monaĝproblemojn ni solvos.  
Ĉiujn viajn vojaĝojn eksterlanden per  
aeroplano ni arangos. Vi povas ŝpari multe  
da mono se vi kontaktos nin *antaŭ* via  
foriro al eksterlando.

Por ni ne ekzistas monaĝproblemoj.  
Pagoj el ĉiuj landoj kaj pagoj en ĉiujn  
landojn estas por ni ĉiutaga laboro. *Vi*  
povas ŝpari de 5% ĝis 80%. Skribu detalojn!

Learn  
ESPERANTO  
by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL  
123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.  
\*\*\*\*\*

*Introduction to*  
**ESPERANTO**  
THE UNIVERSAL LANGUAGE  
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00  
Sent on Five Days FREE Examination!  
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

MEET ME IN ST. LOUIS, LOUIS

## EXECUTIVE BOARD DECISIONS

59-4. That the dates of the 7th ELNA Congress shall be from July 9 to July 12, 1959, inclusive.

59-5. That the Congress dues for the 7th ELNA Congress shall be \$10 per person.

According to UEA Bulletin of 31 August:

All national associations, specialist organizations, local and regional groups are asked to send a letter of thanks to UNITED NATIONS, New York, because of its Secretariat deciding to publish at its own expense the special new posters commemorating the tenth anniversary of the Universal Declaration of Human Rights, with text in Esperanto. Write also to UNESCO, 2 Place de Fontenay, Paris VII, France, as well, expressing solidarity with both agencies.

### Are Your Dues Paid?



### LIFE OF ZAMENHOF

—Edmond Privat —

New Edition by the Esperanto Press  
of Oakville, Ont., Canada



In the U.S.A.

from the Esperanto Library,  
Middleton, Wis.

*Buy a copy and circulate it  
among your friends during  
the coming year.*

**Price: 75 cents**

**W**HEN a mule crosses an imaginary line, he has no difficulty making himself understood by his mule-brethren across the boundary. When man crosses a frontier into another land, he can often not make his simplest wants known. He is out of his element like a fish out of water. He is an isolated stranger in a sea of humanity, insulated from his fellows by a complicated network of language barriers. There are 3,424 languages which isolate him from his world. Sounds silly, doesn't it?

There is a remedy for this situation, which will bring humanity above the level of the jackass. If all nations will adopt one and the same language, and establish it as the common language of all humanity, this lingual confusion will all disappear. This second language should be easy to master, euphonious, flexible, expressive and neutral. It should belong to no nation, for if it did, national jealousies would prevent its universal adoption. It should not supplant the national languages, but serve by their side as the auxiliary language; the second language for every citizen of the world.

Such a language is Esperanto. It is easy, simple, neutral, pleasing to the ear. It is in practical use applied as a thought medium by hundreds of thousands of progressive people the world over, for extending their mental horizons far beyond the confines of their native lands. They do not wait for the rest of the world to put its stamp of approval on Esperanto, but find in it an implement of communication with amazing adaptability and practicality, in a tremendous field; in all the ramifications of our so-called civilization. A strong worldwide network of Esperanto organizations makes this possible.

—Armin Doneis

## Important Notices

The Committee on Translation Problems requests that all readers send to the secretary of the committee as soon as possible ("tuj!" the man says):

a. words for which suitable translations are needed; and/or

b. suggested translations for the words.

*Address letters to:* Charles Chomette,  
8525 Saturn St., Los Angeles 35, Calif.

The Committee cannot answer or correspond with those who write, but your help is needed and will be appreciated.

Words with which the committee is now struggling: Covered wagon, drive-in restaurant, book end, bungalow court, station wagon, brain trust, doughnut, poker faced, hit and run.

Look for a long report in the February *Review*.

## LA ORGANIZA KOMITATESTRO PETAS

Mi urĝe bezonas liston de ĉiuj societoj, kluboj kaj klasoj en Usono. Mi petas ke gvidantoj, prezidantoj, instruantoj, ktp., bonvole informu min kiel eble plej frue.

Wm. R. Harmon, 4725 Briercrest,  
Lakewood, California.

## GRAVA PETO

Helpo al projektita nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*, oni petas informojn pri agadoj deposit 1933, aŭ eventuale pri dato de morto, de:

Barret, John; Benson; Frost; Geoghegan; Hetzel; Jackson, Wayne; Jaffe; Kenngott; Reed, Edwin C.; Sussmuth; Weder.

Bonvolu sendi informojn al:

D. E. Parrish, 328 W. 46 St., Los Angeles 37, California, Usono.

● Mi volas ricevi la tekston de LA ESPERO nacilingve. Jam havas kaj konsentas interŝanĝi ĝin angle, france, germane, hispane, katalune, portugale, kaj en aliaj ricevitaj. Conrad Fisher, sekretario, Esperanto League, 808 Stewart Street, MEADVILLE, Pensilvanio, Usono.

## Dekjara Datreveno Festota en via Societo

Okaze de la datreveno de la proklamo de UNESKO pri Universalaj Homaj Rajtoj, Unesko eldonos specialajn afišojn kun Esperanta teksto por helpi en la festado de tiu grava datreveno. La afišoj estos haveblaj de la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam 2, Nederlando. Por helpi en la festado oni proponas prelegojn, radio-dissendojn, specialajn kunvenojn en kiuj Esperantistoj povos audi pri la progreso de homaj rajtoj kaj la bazaj principoj kiuj subtenas la Deklaracion Universalan pri Homaj Rajtoj.

Ciu grupo estas instigata okazigi feston kun festparolado pri tiuj temoj. Ciu societo kaj klubo estas instigata sendi kelklinian leteron aŭ telegramon, esprimante solidarecon al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco. Jen la adresoj: United Nations, New York; UNESCO, 2, Place de Fontenoy, Paris VII, Francujo. Post plenumo de jenaj proponoj ĉiu grupo estas petata sendi raporton al S-ano Francis Helmuth, kiu kompilos la informojn kaj sendos kompletan raporton al la ĝeneralaj sekretario de UEA por kombini kun raportoj de la tuta mondo, por prezenti formale al UN kaj UNESKO. Ni montru la efikecon de Esperanto por antaŭenigi gravajn celojn kaj idealojn. Ni komencu en niaj proprej lokaj grupoj kaj societoj.

—A. F. D.

- 
- Esperanto Society of Chicago sends out to enquirers a neatly mimeographed circular giving address of its meetings with dates of each this fall and winter. Ask the secretary for a copy if you'd like to have a similar one made to use in your area. The address is Mrs. Roy E. Holland, Sec., Esperanto Society of Chicago, Central YMCA, 19 South La Salle Street, Chicago, Illinois.

## HELPAJ SUGESTOJ --- diversloke trovitaj de via Prezidanto

1. Por faciligi al eksterurbanoj trovi vian Esperanto-societon, listigu ĝin en telefonlibro. Se tio postulas altan reklaman kotizon, vi povas atingi kontentigan rezulton se vi listigos iun individuon en via domo kun la nomo "S-ro Delegito Esperanto", certigante ke "Esperanto" estu ties lasta nomo kaj "Delegito" la unua nomo, tiel ke ĝi aperu en la libro jene "Esperanto Delegito" kune kun via adreso.


2. Petu de bibliotekistino ēe la publikaj biblioteko la permeson englui folieton en ĉiun Esperanto-libron kaj gazeton, surhavantan inviton al kaj adreson de via socio esperantista. Se estas krome permeseble, almetu afišon aŭ anoncon pri la haveblo kaj situo de la esperanto-libra bretaro.

3. Readers Digest nun estas eldonata en 12 lingvoj krom la angla. Skribu kaj instigu ke ili aperigu ankaŭ Esperanto-eldonon. Klarigu ke ili maltrafas bonegan oportunon plivastigi sian influon kaj legantaron per malatento pri la benefiko de Esperanto-eldono. Memorigu al ili ke analfabetoj tute mankas en Esperantujo; ke la legaĵoj en RD estas speciale allogaj al esperantistoj-mondcivitanoj; ke en Esperantujo estas samtioma aŭ eĉ pli granda enloĝantaro kiel en kelkaj nacioj en kies lingvoj nun aperas RD; ke krome la Esperantistaro lojale kaj fiere bonvenigus Esperanto-eldonon de RD.

4. Faru sonbendojn de sukcesaj imponaj publikaj kunvenoj kaj prelegoj pri Esperanto, por pruntedoni ilin al societoj kaj izoluloj helpe al starigo de novaj klasoj aŭ grupoj. Se ili estas eksterordinare bonkvallitaj, sendu al Magnetofona Servo de UEA ēe Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado, por kopiado kaj dispruntado.

5. Kvinhora sonbendo pri ĉiuj aferkunsidoj de la 6a ELNA Kongreso en San

Diego estas pruntebla al respondecaj grupoj kaj individuoj. La teksto estas preskaŭ tute en bona Esperanto. Skribu al la prezidanto. Malfeliĉe ni ne havas sonbendon anglalingvan pri la publika kunveno enhavanta la bonegajn prelegojn de S-anoj Scherer kaj Chomette. En estontaj kongresoj ni klopodos tiajn aranĝi.



Ne estu kiel ĉi tiuj malfeliĉaj neesperantistoj. LERNU ESPERANTON !!

### Pagita Anono Pri Senpaga Distribuo de Esperantaj Cirkuleroj !

(Nepre sendependa kiel ĉiu Libera monda civitano devus esti!)

Cirkulero No. 1a:

KIEL LONGE VI VOLAS VIVI?

Cirkulero No. 2a:

NIA PENSO KAJ MENSO!

Senpaga Distribuo ofertas legadon laŭ Mateo 10:8; "... donace vi ricevis, donace donu!" ĝis Apokalipso 22:7; "... kiu volas tiu prenu donace la akvon de Vivo!" Ĉu estas io en tutmondo pli inda ol longa, sana, efika, kaj ne bestigita homa Vivado? Ja mendu vian plej gravan kaj veran legadon ĝe: Senpaga Distribuo de Esperanto, 2547 Montgomery St., St. Louis 6, Missouri, U.S.A.

## ENIGMO

↓	2	12		
6	14	13	13	3
5	3	7	11	14
13	2	8	2	2
4	2	5	15	12
1	8	13	9	13
2	3	4	10	7

Ciu numero signifas unu literon.

1. Diligenta insekto: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 2
2. Astro: 7, 8, 9, 10, 2
3. Ambaŭtranĉa pikarmilo: 11, 2, 12, 13, 3, 14, 2
4. Blanka akvo: 12, 9, 15, 2

En ĉiun kvadraton enmetu tiun literon, kiun la numero signifas, tiam legu alterne malsupren-supren, komence laŭ la direkto de la sago. La tutaj teksto donas esperantan proverbon.


La solvon bonvolu sendi al la redaktoro de la Revuo. Solvo kaj nomoj de solvintoj aperos en venonta numero.

Enigma sendita de A. Holzhaus.

Solvo de la oktobra enigma: 1. militi;; 2, kiu; 3. nun; 4. espero; 5. kaj; 6. se; 7. amara; 8. tiu; 9. nenia; 10. ses; 11. deklivo; 12. nukso; 13. Alabama; 14. veziro.

Solvis ĝin: Neniu.

**ST. LOUIS EN JULIO**



1. Kortumo decidis, ke geinfanoj de diversaj gentoj rajtas viziti unu kaj la saman lernejon. Por tiun ĉi decidon efektivigi, la prezidanto sendis al la lernejo trupon da militistoj. Por pruvi sian propran opinion, la ŝtatestro fermis lernejojn.

2. Iam monarko vizitis juĝeton, aŭskultis unu partion kaj decidis: "Tie ĉi vi pravas." Poste li permesis paroli la alian partion kaj konkludis: "Tie ĉi vi pravas." Kiam la juĝisto plej humile rimarkis, ke ambaŭ partioj samtempe ne povas pravi, la monarko konsentis: "Tie ĉi vi pravas."

*sendita de A. Holzhaus*

*Television Factbook* diras ke 42,400,000 usonaj hejmoj, 84% de la tuto, posedas almenaŭ po unu televiziilojn. Por komparo, 39,000,000 havas telefonservon, kaj 41,500,000 havas bankuvojn.

Originale Verkita Novelo

LA SEGO DEKTRIA

de George E. Wagner

Havebla ĉe Esperanto League Book Service, aŭ ĉe: Geo. E. Wagner,  
403 E. North St., Tampa 4, Florida

Prezo 45 cendoj aŭ 7 steloj

Beers Book Center, 1406 J St., Sacramento, California, sells the textbook, "Teach Yourself Esperanto." \$2.75.

# Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

## THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ū, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in :“Are there three or two?” The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in *go*, *ĝ* as *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

## THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *nau*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *si*, *gi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.



To all of you; and to the men who bring you the Review

**Happy Holidays!**

---

**The North American Esperanto Review**

2116 North 35 St., Seattle 3, Washington, U. S. A.

PRINTED MATTER  
Return and Forwarding Postage Guaranteed

**BULK RATE**

